

Monda Tago de Radio 2021: evoluo, novigo kaj konekto



La 13-an de februaro fariĝis Monda Tago de la Radio en 2011 kiam Unesko tion proklamis, kaj sekvajare, en 2012, la ĝenerala asembleo de UN adoptis ĝin.

La radio estas potenca ilo por celebri la homaron en sia diverseco kaj konsistigas platformon por demokratia diskurso. En la monda skalo, la radio daŭre estas la plej konsumata amaskomunikilo.

Ĝia kapablo atingi plej vastan aŭdantaron signifas ke la radio povas speguli la socian diversecon, povas iĝi scenejo por ke ĝiaj voĉoj esprimu sin, estu reprezentataj kaj estu aŭskultataj.

Por celebri ĝin en 2021, Unesko alvokas ĝiajn radiostaciojn festi la dekan datrevenon de tiu ĝi evento kaj la pli ol centdekjaran ekziston de la radio.

La ĝi-jara celebros dividiĝas en tri ĝefajn subtemojn, nome, Evoluo, tiel ke la mondo ĝanĝiĝas, la radio evoluas. Temas pri la rezistemo de la radio kaj ties daŭripovo.

La dua temo estas, novigo, tiel ke la mondo ĝanĝiĝas kaj la radio adaptiĝas kaj novigas. Estas fakto ke la radio devis adaptiĝi al la novaj teknologioj por plu esti la amaskomunikilo de la movebleco, alirebla ĝie kaj por ĝiaj.

Kaj la tria temo estas konekto, tial ke la mondo ĝanĝiĝas kaj la radio konektiĝas.

Tiu ĝi subtemo reliefigas la radiajn servojn por nia socio: katastrofoj naturaj, sociekonomiaj krizoj, epidemioj, ktp.

En Kubo, la asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU) festis la mondan tagon de la radio kun speciala omaĝo al Radio Havano Kubo, kiu festas sian 60-jaran jubileon.

Pro la nuna epidemiologia situacio, la porokaza ceremonio okazos en venonta momento decidota. Tamen, per informo donita de la ACNU, diversaj amaskomunikiloj diskonigis ke en Kubo, la Monda Tago de radio 2021 celebras la 60-an jubileon de Radio Havano Kubo, via amika vo?o trairanta la mondon! Gratulojn al ?iuj radioamantoj kaj radiofaristoj.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/247515-monda-tago-de-radio-2021-evoluo-novigo-kaj-konekto>



Radio Habana Cuba